

Sud-Rejna Kuriero

Julio
2013

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°51

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj
gesamideanoj, karaj legantoj,*

*Jam alvenis la someraj monatoj.
Nia lernojaro finiĝis per komuna
manĝo la 13an de junio ĉe Maria.*

*Niaj ĉefaj aktivaĵoj bone funkciis
en lastaj monatoj. La verdaj fadenoj
en la lastaj lundoj de monatoj ĉiam
allogis partoprenantojn. Ni daŭri-
gos ilin en venonta septembro.*

*La partopreno de nia grupo en la
manifestacio "Vivu via strato" preskaŭ ĉiu-dimanĉe matene estis sukce-
sa. Vi legos pri ĝi.*

*Jen ankaŭ invito portopreni la komunan aranĝon de Bavelo kaj EFE
en Speyer en oktobro.*

Kaj finfine ni deziras al ĉiuj :

André Grossmann



Mulhouse fotita ekde Brunstatt

Agrablajn somerajn feriojn

Dimanĉe	25.08.2013	Ekskurso de Riehendorf al Inzlingen tra Rothengraben-Eiserne Hand-Buttenberg
Ĵaŭde	26.09.2013	Rendevuo : 10a Riehen-Dorf (Tramhaltejo Ni parolos pri la somero en .Riehenring 129 (antaŭa salono)...Ek de la 20a15
Lunde	28.10.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadenó“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	14.11.2013	Programo en Riehenring 129 (antaŭa salono) Ek de la 20a15
Sabate	14.12.2013	Zamenhofa festo en Francio

Nicole Bérout

Bavelo-Kalendaro 2013

21. aŭ	28.9.2013	Soulzbach(F): komuna migrado en la Vogezoj
05.10.2013		Lusse (F).Amika Tago en la budisma centro
06.-11.10.2013		Zell;Mosel(D):3-a Aŭtuna Esperanto-migrado (EHW)
18.-20.10.2013		Speyer (D):35-a BAVELO-Seminario kaj 74a staĝo de Espéranto France-Est

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2012-2014

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivajn rolojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono
2013	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM
Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Espéranto CCP 19684 F Strasbourg.

Impression trompeuse :

On nous donne l'impression qu'en apprenant l'anglais toutes les portes nous sont ouvertes. Impression malheureusement fort trompeuse. Si vous faites des études universitaires et chercher un travail dans une entreprises internationale, il est possible qu'on exige de vous que vous parliez anglais.

Dans d'autres domaines, il en va tout autrement:

Le locataire slovaque de ma mère vivant au bord du Lac Léman voulait faire venir sa fille, pour qu'elle travaille dans la vente ou dans le social.

A cet effet, elle a donc commencé à apprendre le français, langue utilisée dans la région lémanique. Or après un certain temps, elle a changé d'idée et à commencer à apprendre l'anglais, dans l'idée trompeuse, qu'avec une langue internationale, elle s'en tirera mieux.

Erreur fatale, si elle travaille dans le social, par exemple à l'hôpital ou ailleurs elle aura à faire à la population locale, qui pour une part aura appris l'anglais, plutôt les plus jeunes, mais particulièrement chez les personnes âgées qui ont besoin d'aide maintenant n'ont pas appris l'anglais et ne pourraient pas s'entretenir avec elle.

De même dans la vente ou dans le service dans des restaurants ou des hôtels, là aussi la langue locale est absolument indispensable. En tout cas l'anglais peut être utile pour s'occuper de quelques touristes de passage, mais pour un travail à longue échéance l'anglais ne suffira souvent pas.

Ainsi il y a des années que Migros Bâle faisait appel aux jeunes alsaciens d'apprendre l'allemand pour pouvoir ensuite travailler en Suisse. Il vaut donc la peine d'apprendre une 2ème langue nationale et une langue internationale, l'anglais ou l'esperanto !

Falscher Eindruck :

Man bekommt den Eindruck, wenn man Englisch lernt, dass einem alle Türen geöffnet. Der Eindruck täuscht. Wenn Sie an der Uni studieren oder eine Arbeit in einer internationalen Firma suchen, kann es sein, dass man von ihnen Englischkenntnisse erwartet. Auf anderen Gebieten geht es ganz anderes zu :

Der slowenische Untermieter meiner Mutter, die am Genfer See wohnt, wollte seine Tochter kommen lassen, damit sie im Verkauf oder im

sozialen Bereich arbeiten kann. In der Tat hat diese dann angefangen französisch zu lernen, da Französisch in diesem Gebiet benutzt wird.

Doch nach einer gewissen Zeit hat sie ihre Meinung geändert und hat angefangen, Englisch zu lernen, mit der irrigen Idee, dass sie

mit einer internationalen Sprache weiterkommen würde.

Tragischer Irrtum, will sie im sozialen Bereich arbeiten, z.B. im Krankenhaus oder anderswo, wird sie mit der lokalen Bevölkerung zu tun haben, die zum Teil gelernt hat, wenn es sich um junge Menschen handelt, aber besonders die älteren Leute, die jetzt Hilfe brauchen, können kein Englisch und könnten sich nicht mit ihr unterhalten.

Das gleiche im Verkauf oder im Service in Restaurants oder Hotels, auch da wird die lokale Sprache ist absolut nötig. Auf jeden Fall kann Englisch nützlich sein, um sich um einige Touristen, die auf der Durchreise sind, aber für eine langfristige Arbeit wird Englisch nicht reichen.

Vor etlichen Jahren schon rief Migros-Basel junge Menschen im Elsass Deutsch zu lernen, um dann in der Schweiz zu arbeiten. Es ist es also Wert, eine zweite Nationalsprache zu lernen und eine internationale Sprache, englisch oder Esperanto

Verdaj fadenoj por amike babili nur en Esperanto

Verdaj fadenoj estas niaj monataj babil-kunvenoj, kiuj regule okazas en la lasta lundo de la monatoj. Ilin iniciatis Bertrand kaj Jacques kun la celo doni la okazon al la partoprenantoj uzi Esperanton en tute amika etoso. Tial ĉiuj evitas krokodili kaj povas iel perfektigi en la lingvo ekster oficiala Esperanto-kurso.

Jacques proponis kafejon en Mulhouse kaj Bertrand restoracion en Saint-Louis. Tiel plej ofte, post agrabla babilado eblas kune manĝi. En Mulhouse la manĝo estas iom pli simpla, sed la etoso estas ĉiam amika, agrabla kaj eĉ gaja.



Kiam la kunveno okazas en Saint-Louis, ni plej ofte havas la plezuron ankaŭ akcepti membrojn de la Bazela grupo, kun kiu ni jam kunlaboras por eldoni nian lokan bultenon Sud-Rejna Kuriero. Ĝi estas fakte la komuna bulteno de niaj ambaŭ asocioj.

En 2013 ni regule kaj laŭplane kunvenis ĝis la 24a de junio. Ĉiuj plenkonsente akceptis, ke la verdaj fadenoj denove okazu en la venonta lernojaro 2013/2014. La unua okazos en Mulhouse la 30an de septembro.

Krome ni ankaŭ diskutas pri estontaj agadoj, interalie pri la venonta Zamenhof-festo, pri kiu aparte zorgas Jacques. Ĝi okazos la 14an de decembroj 2013.

Ivo iniciatis la organizadon de nia regiona staĝo en Storckensohn por la 4a ĝis 6a de aprilo 2014.

Kompreneble ceteraj membroj aktive kunlaboras por la sukceso de tiu aranĝo.

Edmond esploras pri la preleganto kaj por la distra vespere.

Andreo jam skizis la staĝodokumentojn kun la aliĝilo.



Andreo proponis al iuj membroj de nia grupo aliĝi al nova dissendolisto, kiu nomiĝas **verda-babilejo**. Ĝi ne celas informi la membrojn pri iuj eventoj, sed nur doni la eblecon interŝanĝi mesaĝojn en Esperanto pri plej diversaj temoj. Bernard estas unu el la plej fidelaj babilantoj en tiu listo. Eblas aliĝi per sendo de mesaĝo al :

verda-babilejo-abonnement@yahoogroupes.fr

Niaj venontaj fadenoj okazos tre verŝajne:

30an de septembro en Mulhouse

28an de oktobro en Saint-Louis

25an de novembro en Mulhouse

Andreo

En Mulhouse:

en la kafejo: 7 rue du printemps

En Saint-Louis:

en restoracio: de la Poste, 10
rue de Huningue.

Vivu via strato !

Jam la duan jaron nia esperanto grupo partoprenas al la manifestacio de *vivu via strato*. Du novaĵoj en ĉi-tiu jaro : unue, la disponigo de tablo kaj benko, due la malbela vetero. Oni devas modeste akcepti la duan. La unua simpligas la deĵorado ĉe la budo. Ĝi troviĝas samloke, en la mezo, apud eta arbaro. Ĉi-lasta afable ebligas alkroĉi la esperantan flagon. Dankon al ĝi.

Por deĵori oni bezonas:

Krom librojn, afiŝojn, prospektojn, flagon sed ankaŭ puŝ-najletojn, glu-paperon tablo-tukon, skribilon..., bieron ? Oni povas, kiel R., prezenti afiŝ-tabulon kun surskribo : Venu paroli pri Esperanto kun mi (en la franca, kompreneble).



Tiel oni estas preta por prezenti ĉarman budon.

Tiam vi povas akcepti la pasantojn, kiuj ofte volonte scivoleme alproksimiĝas :

Saluton, est ce que vous avez déjà entendu parler de l'espéranto ?

Kaj ek al la babilado ! Le demandoj pluas : Kiom da personoj parolas en la mondo ? Ĉu vivanta lingvo ? Ĉu malfacila lernado ? Kial lerni tiun iom novan lingvon ? Ĉu la ĉinoj ankaŭ parolas Esperanton ? ktp.

Do ni, deĵorantoj, pasie klarigas kaj parolas pri Zamenhof, pri la principo de la aglutina lingvo (lerni unu vorton estas kvazaŭ lerni dek vortojn), pri sen-esceptaj kaj tute regulaj ortografio kaj gramatiko, pri la prononcado de ĉiuj literoj (do oni skribas kiel oni parolas).



Pensu, oni lernas Esperanton sep foje pli rapide ol la tiu (lingvaĉo) vi scias !!

Ne forgesante pri pli profundaj rezonadoj : la humanisma radiado, la malfermo al la aliaj, la nehegemonio, la kunigoj inter la popoloj.

Ha, tio estas kuraĝiga !

La publikoj konsentas. Kaj fine diras :

Mi konsentas kun vi, nepre daŭrigu, kaj... foriras !!!


Ne gravas, la esenco estas la disvolviĝo, la diskutado, planti semojn, kiuj en iu ajn momento aŭ en alia okazo elstaros!

Post 12a30, grade oni ordigas la aferojn kaj la tagmanĝo aperas sur tablo. Tial oni ĝuas spektaklojn : teatro, kanzono, fabelo, muziko, ktp. Oni babilas kun aliaj homoj, oni intersanĝas manĝaĵojn, oni trinkas, poste oni siestas sur ĝardena seĝo aŭ sur la herbo. Tute agrabla tago !

Praktikaj informoj :

La manifestacio okazas ĉiujn dimanĉojn ĝis la 27a de julio de la 10a30 ĝis la 12a30.

Ĉiam en la sama loko : en Mulhouse malantaŭe la glitkurejo (patinoire), apud la ĉina ponto (Pont chinois), laŭlonge de la rivero L' Ill.



Aperis en la ĵurnalo l'Alsace
en junio 2013

La palette des activités qui seront proposées (ponctuellement pour certaines, régulièrement pour d'autres) par les autres intervenants sera large : initiation au dessin manga, jonglerie, mandala, contes pour enfants, réalisation de gris-gris, initiation à l'espéranto, atelier d'écriture, maquillage... « La philosophie de tout ça, c'est le partage, le don et le contre-don, la convivialité. On se met à disposition des gens de façon toute simple, on leur dit: voilà, nous avons des choses à vous apporter et vous aussi vous avez des choses à nous apporter. Ne serait-ce qu'un sourire ! », dit Palma.

Jarfina fest-manĝo ĉe Maria en Hindlingen

La lernoĵaro finiĝas fine de junio. En Espace 110 daŭre funkciis nia kurso kun 5 gelernantoj. Ĉi-jare ni uzis la bildrakontojn de *Tinĉjo en Tibeto* poste *Amuzaj dialogoj* kaj laste la plej novan Tinĉjon *La templo de l'suno*.

Por festi la finon de la lernoĵaro de nia grupo

"Mulhouse-Esperanto" eblas elekti taŭgan restoracion aŭ okazigi la manĝon ĉe unu el niaj membroj. Efektive ĉi-jare Maria Fournier proponis ĝin organizi en sia hejmo en Hindlingen. Tie ŝi havas vastan ŝirmitan lokon, kie eblas akcepti pli ol 20 personojn. Krome ŝia edzo Eugène volonte proponas sian specialaĵon, nome frititajn karpojn.

Ne estas facile kunvenigi ĉiujn membrojn en la sama vespero. Necesis elekti inter la datoj de la 13a kaj 14a de junio.

Post enketado, ni finfine elektis la 13an de junio. Tiam Maria havis ankaŭ gastojn el Norda Irlando, kiujn ŝi volonte deziris inviti al nia fest-manĝo.



Jam post la 18a vespere alvenis la unuaj partoprenantoj. Aperitivo kaj diversaj aperitivaj manĝaĵetoj estis bonvenige proponitaj. Estis varma tago, sed en la vespero jam nigraj nuboj minacis kaj baldaŭ necesis ŝirmiĝi.

Tie jam estis metitaj tele-
 roj por la gastoj. Viglis
 la diskutoj en Esperanto,
 ankaŭ en aliaj lingvoj,
 laŭ la gastoj, laŭ la mo-
 mentoj kaj la temoj. Inter
 la gastoj ja troviĝis an-
 kaŭ ne-esperantistoj.

Dume Eugène aktivis
 por friti la karpojn, kiuj
 tre baldaŭ atingis la tele-
 rojn de la gastoj. Krome
 li ankaŭ proponis bon-
 gustan alzacan vinon.



Maria kun la helpo de
 Simone ankaŭ pri-
 zorgis bongustajn de-
 sertojn, frambo- kaj
 mirtelo-tortojn. Simone
 eĉ mendis kukon kun

Tiam ekregis iom da silento por plene
 ĝui la bongustajn frititajn karpojn.

Ankaŭ estis interese diskuti kun la
 gastoj el Norda Irlando, Chris kaj
 John Murray, kiuj restadis iom da ta-
 goj ĉe Maria. Ili estis kontentaj ren-
 konti esperantistojn de la regiono. Ili
 vojaĝas per sia ruldomo.



surskribo "Vivu Esperanto".

Ĉiuj aparte dankis al Eugène kaj Maria, kiuj tiom
 agrable kaj kompetente akceptis nin.

Fotoj kaj teksto de Andreo

Akcepto de eksterlanda gasto el Tajvano.

Komence de junio Bertrand akceptis dum kelkaj tagoj en sia hejmo gaston el Tajvano, nome s-ron Abengo, kun kiu Anne jam konatiĝis okaze de sia antaŭa vojaĝo al Tajvano.

Kiam Anne estis en Tajvano ŝi montris al li bildojn pri Alzaco, sed ĉi-foje ŝi havis konkretan okazon malkovrigi al li Alzacan

Anne proponis al Abengo iri al Strasburgo, kaj kune viziti nian belegan alzacan ĉefurbon. Bonŝance la vetero estis belega. Post la vizito al la katedralo kaj turisma ŝip-veturado, ili rendevuis kun Bruno Flochon, kiu afable gvidis ilin tra la Petite France. Post Strasburgo Anne kaj Abengo vizitis la monton Sankta Odilo.

La postan tagon, ĵaŭdon la 6an, laŭ la deziro de Abengo, Bertrand kaj Abengo iris sur la spurojn de Albert Schweitzer en la valo de Munster (Kaisersberg, Guns- bach)

La saman vesperon Bertrand invitis membrojn de nia grupo por kune konatiĝi kun lia gasto Abengo. Kiel kutime, Bertrand tre bone zorgis pri siaj gastoj, kiuj povis aprezi bongustajn flam-tortojn.

Abengo parolis pri Tajvano, pri tradicia religio en Azio, sed

ankaŭ pri kristanismo kaj biblio, kiun li ankaŭ tre bone konas (eĉ pli bone ol multaj francoj).

Abengo ankaŭ elvokis la I-Ĝingon, ankaŭ nomata **libro de Ŝanĝoj**, kiu estas tre malnova klasika ĉina libro. Fakte mistera libro, kiun oni ofte konas kiel aŭgurilon. Laŭdire, ĝi ankaŭ povas helpi en nia nuntempe vivo, ekzemple kiam oni malfacile sukcesas ion decidi. Abengo diris, ke nuntempe veraj I-Ĝingo-majstroj ne plu ekzistas, eĉ en Ĉinio. Por funde esplori la misteran libron, Abengo tradukis la I-Ĝingon en esperanton. Malfacila laboro!

Ni esperas, ke Abengo prezis sian restadon en Alzaco, kaj havos bonajn memorojn de alzaca esperantujo.



Tutmondismo mondcivitaneco kaj Esperanto

"Tutmondismo" (en la franca mondialisme) kiun multaj malprave konfuzas kun "Tutmondiĝo" (en la franca globalisation économique) tute ne temas pri ia ekonomia mondrealeco kaj ankoraŭ malpli pri la laŭdira neevitebla internacia liberalismo. Tutmondiĝo naskiĝis pro la rifuzo vidi, post la atomaj eksplodoj de Hiroŝimo kaj Nagazako, la homan specion memdetruiri sin. Hodiaŭ ve! Krom tiu ĉiama nuna nuklea minaco, aldoniĝas aliaj al ĝi: poluado de la oceanoj, disrabo de la malriĉaj landoj, financa spekulado mondscale..... kaj tiel plu.

En 1948 du viroj strukturis la movadon: la usonano Garry Davis kaj la franco Robert Soulage. La unua, kiu pli poste edziĝis al juna strasburga alzacanino, estis malliberigita post sia "sovaĝa interveno" en la UNo-sembleo (Unuiĝintaj Nacioj) ĉar li volis paroli je la nomo de la ne ĉeestantaj popoloj en 1950. La dua estis granda rezistanto dum la dua monda milito kun la pseŭdonimo de Sarrasac.

En 1975 estis allasita en Parizo la jena difino:

Tutmondismo estas aro de ideoj kaj agadoj, kiu esprimas solidarecon de ĉiuj popoloj kaj kiuj celas starigi instituciojn kaj supernaciajn leĝojn strikte respektantaj la popolo- kaj kulturo-diverŝecon. Tutmondismo strebas proponi novan politikan homaran organizon per transloko de nur kelkaj partoj de nacia suvereneco al alia monda federativa ordonpovo kiu kapablas solvi per demokratiaj decidoj la problemojn pri la sorto de la homa speco.

Konkrete tutmondiĝo celas starigi "mondan assembleon" (iomete kiel la internacia justica kortumo). La vojo, oni facile imagas tion, mallarĝas fronte al la naciaj egoismoj. (vidu la malgajan UNo-spektaklon). Por atingi tiun objektivon, estis kreita en 1963 la "Kongreso de la Popoloj" regule elektita de la mondcivitanoj. La mondcivitana registro naskiĝis en 1949. La mondcivitano restas sendependa, libera pri siaj ideoj solidarecoj kaj engaĝiĝoj. Registri sin kiel mondcivitano ne signifas aniĝi al ia movado sed simple deklari sian identecon kaj la volon defendi, kun la ceteraj homoj de la mondo, la komunan bonon: nian planedon. Kaj pri Esperanto: ĉu ne estas internacia, neŭtrala kaj justa lingvo? Ĉu ne estas komunika kaj interkomprena ilo inter la homoj de la tuta mondo? Do, kial ne pensi ke ankaŭ ĝi estas ideala laborilo por helpi la tutmondisman disvastigadon.

Tutmondismo, mondcivitaneco, Esperanto: sama batalo.

Jacques

Kial Kishida Ryusei direktiĝis al la realismo?

Kishida Ryusei estas famekonata en Japanio, ĉefe pro siaj realismaj pentraĵoj, ekzemple kiel: "Vojo, digo kaj muro" (1915) (Fig.1) Ni kune rigardu tiun pentraĵon.

Observante en muzeo la pentraĵon "Vojo, digo kaj muro" pentritan de japana oleopentristo Kishida Ryusei (1891~1929), eblas rimarki, ke en la pentraĵo subite konverĝas muro kaj vojo kvazaŭ ili direktiĝas al la ĉielo konkure unu kun la alia. Dekstre de la deklivo daŭras digo kun freŝaj naturaj arbustoj, arboj kaj herboj. Dume, maldekstre troviĝas artefarita blanka muro. Du elektraj fostoĵoj ĵetas sian ombbron teren. La ĉielo estas tute blua kun iom da nuboj pentritaj per nur iom da oleo. Diversaj sentoj povas aperi al spertulo. La majstro pentris ĝin laŭ kruta perspektivo. La aŭtoro ne ignoris eĉ unu ŝtoneton sur la tero. La ŝtoneto en la antaŭa bildo rimarkigas al la spektanto lian delikatan pentro-manieron. Li metis kaj helan kaj malhelan kolorojn sur ĝin por esprimi klar-obskuron de la ŝtono. Krome li metis blankan punkton sur ĝin per peniketo por pentri la rebrilon sur la ŝtoneto. Li ankaŭ pentris detale herbojn ĉe ambaŭ flankoj de la vojo.

La estonta majstro Kishida Ryusei naskiĝis kiel la 4a filo el 14 gefiloj de Kishida Ginkoo kaj Katshu en la urbo Ginza en Tokio en 1891. Li perdis siajn gepatrojn en sia 14a jaro. La soleca knabo ekiradis al preĝejo kaj tie renkontiĝis kun pastro Tamura Naomii. La estonta pentristo iĝis fervora admi-




Fig. 1 "Vojo, digo kaj muro" (1915)

ranto de la pastro, kiun ankaŭ lia forpasinta patro profunde respektis en sia vivo. La knabo ĉesis iradi al mezlernejo kaj ekiradis al dimanĉa lernejo en sia 15a jaro. Li volis fariĝi pastro kaj konsultis la pastron, sed ĉi-lastata forte rekomendis al li fariĝi pentristo pro tio, ke li havis fajran karakteron. Sed oni ne povas forgesi, ke la estonta majstro jam montris intereson pri arto en sia infan-aĝo. La petolema knabo lerte faris falsan kapon de mortinta virino kaj metis ĝin en riz-keston¹. Ĝi ege sukcesis surprizi servistinojn dungitan de la familio. Tio signifas, ke li jam montris tendencon al la realismo. Li eniris en la instituton de oleopentristo Kuroda Seiki gvidis siajn lernantojn. Ryusei komence pentris laŭ la impresionismeca pentro-maniero de

1. Kesto, farita el ligno, kiu troviĝis en kuirejo por konservi kuiritan rizon.

Oni uzis ĝin en malnova tempo en Japanio.

Kuroda. Tial liaj du pentraĵoj estis samtempe elektitaj por la ekspozicio de Ministro pri Edukaj Aferoj en lia 19a jaro, ĉar lia instruisto Kuroda estis unu el la ekzamenantoj de tiu ekspozicio.

Mushanokoji Saneatsu, Shiga Noaya, kaj Satomi Ton ktp. verkistoj eldonis en 1910 literaturan revuon "betulo", kie oni ankaŭ prezentis la francajn impresionistojn kaj post-impresionistojn. En 1911 li ekkonis tiun

revuon kaj admiris fotojn de la pentraĵoj de post-impresionistoj. Aparte la majstro Van Gogh multe influis lian pentro-manieron, kaj la postan jaron li skribis, ke li preskaŭ tute imitis la verkojn de tiu majstro. La verko "Koncesiita loĝejo, Chikujii" (1912) (Fig. 2) estas unu el tiaj verkoj. La pentristo Ryusei ankaŭ uzis perspektivon por pentri deklivon, same kiel li faris okaze de pentrado de la unua verko. Sed kompare kun la unua pentraĵo, en la lasta, la formoj de homo, hundo, arboj kaj muro estas simpligitaj. Li uzis klarajn kolorojn, kiuj similas la primitivajn kolorojn, por pentri la vojon kaj la ĉielon. Li lasis postsignojn de peniko sur la ĉielo kaj pordego. Ĉi tiuj estas ankaŭ karakterizaĵoj de la verkoj de Van Gogh.

Sed estas fakto, ke li ne nur lernis pentradon de post-impresionistoj sed ankaŭ admiris ilian heroan sintenadon batali kontraŭ akraj kritikoj fare de konservativaj pentristoj kaj kritikistoj. Ryusei rimarkis tion kaj diris, ke post-



Fig.2 "Koncesiita loĝejo, Chikujii" (1912)

impresionistoj instruis lin, ke li devas pentri laŭ la deziroj el sia koro, sed ke li devas malproksimiĝi de la maniero fare de tiu skolo, se li sekvas tiun konsilon. Forĵeti stilon de post-impresionistoj estas lia estimo al tiuj, kiuj instruis al li severan sintenadon por esplori individuecon. Krome li skribis, ke pentraĵo ja devas reprezenti naturon kaj, ke estas pli bone pentri laŭ motivo, kiel li vidis. La tendenco de liaj verkoj pli kaj pli ŝanĝiĝis al la realismaj pentraĵoj, kiel la unua pentraĵo kun kruta deklivo.

Kial li multe pentris deklivojn? Ryusei ofte elektis deklivojn kiel motivojn. Ekz. "Ĉe Yoyogi" (1914), "Ruĝa argilo kaj herboj" (1915), "Frua printempo" (1916) ktp. pli ol 5 verkoj. Multaj el ili temas pri suprenrigardo de malsupre al supre de deklivo. Luj opinias, ke tio rilatas al lia kristana tempo. Li profunde kredis Dion en sia juneco. La deklivo pentrita de li aspektas kvazaŭ ŝtuparo al Dio.

M.M.

74a regiona staĝo de

esperanto
France-Est

35a BAVELO-Seminario

Junulargastejo de Speyer
Kurpfalz-Jugendherberge Geibstrasse 5
DE-67346 Speyer

Tel: +49.6232/61597

Fakso: +49.6232/61596

Okazos en Speyer en Germanio
de 18a ĝis 20a de oktobro 2013

Speyer (latine Spira) jam en la romia epoko estis tre grava urbo, sed sian kulminon ĝi spertis en la mezepoko. La plej okulfrapa daŭraĵo el tiu tempo estas la imperiestra katedralo, ĝi estas la plej granda romanika preĝejo de la mondo, de 1981 agnoskita monda heredaĵo.

- Krome Speyer havas multajn aliajn vidindaĵojn, kaj dum via vizito vi havos ŝancon vidi unu aŭ alian. **Ni aparte rekomendas jenajn:**
 - Historia muzeo • Teknika muzeo (kun vaste videbla ŝvebanta "Jumbo Jet" kaj kosmopramo Buran)
 - Sea Life (belega prezentado de submara mondo kun interesaj marbestoj) muzeo Ŝpira (en mezepoko Speyer havis tre gravan grandan judan komunumon)
 - Purrmann-domo (pri lernanto kaj amiko de pentristo Matisse)
 - Feuerbach-domo (pri pentristo Anselm Feuerbach)
 - Arkeologia montrofenestro (observi arkeologojn dum laboro)
 - Elvedriĉe-muzeo (pri petolemaj fablitaj bestoj, kiuj aperas post troa drinkado)



Teknika Muzeo: Boeing 747, kutime nomata „Jumbo Jet“, ŝvebas super la granda halo. Ĝi estas publike alirebla. Krome videblas la rusa kosmopramo "Buran" kaj aliaj veturiloj ĉiuspecaj.

A 1 **komencantoj - (Frank Vogler)**

Unua renkontiĝo kun la internacia lingvo por komencantoj (germanparolantaj). Bazaj trajtoj de la gramatiko, unuaj frazoj. - Kie kaj kiel apliki Esperanton? Pasporta Servo kaj aliaj proponoj.

A 2 **komencintoj - (Johannes Mueller)**

Por komencintoj, kiuj jam iomete lernis. Simplaj dialogoj kaj ekzercoj.

P **Paroliga kurso (Edmilson Lima Serejo)**

Rekomendinda por ĉiuj, kiuj jam eklernis Esperanton kaj bezonas trejnadon kaj instigon al aktiva parolado pri interesaj temoj.

B **Bukeda kurso**

Bukedo de temoj por parolantoj. Antaŭvidataj estas interalie jenaj

- Alois Eder – *Tatoeba, la japana frazaro multlingva*
- Julia Noe – *Pakstacio. Kiel nova servo de la poŝto fariĝas objekto de deziro. Krimrakonto en kvar scenoj*
- Jean-Luc Thibias – *Novaj libroj*
- Horst Vogt – *Kiel studi Esperanton en Poznań*
- Ramon Perera – *Katalunio, ĉu baldaŭ nova sendependa ŝtato en Eŭropo?*



Alveno trajne:

Speyer estas trajnstacio de la linio Ludwigshafen-Karlsruhe. De la stacidomo navada buso veturas rekte al la haltejo Jugendherberge.

Alveno aŭte:

Speyer situas ĉe Rejno kaj Federacia strato B9. Enirante la urbon sekvu la indikojn *Dom/Museum* poste *Technik-Museum* kaj *Jugendherberge*.

Provizora Programo de la BAVELO-Seminario

Programo

vendredo, 18-a de oktobro 2013

15:00 alveno por
frualvenantoj
15:30-17:30 ???????

17:00-18:00 alveno
18:30-19:30 bonvenigo,
vespermanĝo
19:30-20:30 kursoj parto 1
20:45 bunta vespero
(instiganto Jochen
Wagner)
- interkonatiĝo
- muziko
danach vespera trinkejo

sabato, 19-a de oktobro

07:45 - 08:30 matenmanĝo
09:00 - 10:15 kursoj parto 2
10:30 - 11:45 kursoj parto 3
12:00 - 13:00 tagmanĝo
13:30 - esperantlingva
laŭdo en Afra-kapelo en la
katedralo kun Albrecht
Kronenberger; tempo por
gvidado tra la katedralo
16:00 - 17:30 boatekskurso al
Altrhein (mortinta brako de Rejno)
paralele: vidindaĵoj de la
urbocentro: juda banejo, Altpörtel
18:00 - 19:00 vespermanĝo
19:00 - 20:30 kursoj parto 4
poste vespera trinkejo

dimanĉo, 20-a de oktobro

07:45 - 08:30 matenmanĝo
08-a - 9-a (?) esperantlingva
diservo en la
junulargastejo kun
Albrecht Kronenberger
08:30 - 09:30 forlasi la
ĉambrojn
09:30 - 10:30 kursoj parto 5
10:30 - 11:30 kursoj parto 6
12:00 - 13:00 tagmanĝo

Aliĝilon bonvolu sendi al:
S-ino Inge SIMON,
Brünner Str. 20
DE-73431AALEN
Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.
Simon@esperanto.de

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas. La aliĝo validas post alveno de mono:
Pagebla per ĝiro al
CCP Esperanto France-Est
1997 72 W Nancy
per franca ĉeko al
Esperanto France-Est
sendata al
André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo : <http://esperanto-bw.de/seminario-eo> :

Nia seminariejo:

Kurpfalz-Jugendherberge

Geibstraße 5

67346 Speyer

Telefono: 06232/61597

Telefakso: 06232/61596

Kostoj:

Aliĝo plenkreskulo: 30,- €

junulo (13 - 27 J.) 10,- €

familio (gepatroj kun ĉiuj infanoj Boat-ekskurso: 9,50 €

kune) 30,- €

Du tranoktadoj kaj ĉiuj manĝoj

en kvarlita ĉambro 75,00 €

en du-lita ĉambro 85,00 €

Ekskursoj:

SeaLife – 15 €

* nur ĉe antaŭmendo ĝis 30.9. –

7,50 €

Teknika Muzeo – 14 €

Historia Muzeo de Palatinato – 7 €

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Speyer

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
Adreso		
Telefono:		
Ret-adreso:		
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est		

Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon

A1 komencanto 1 A2 komencanto 2

P Paroliga kurso B Bukeda kurso

**Mi / ni volas partopreni la programon por
frualvenantoj:** Jes Ne

Mi / ni volas tranokti en la junulargastejo:

en kvarlita ĉambro

en dulita ĉambro

Manĝoj:

Mi / ni volas manĝi vegetare

Alergio kontraŭ Sen manĝo

Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe
matenmanĝo			
tagmanĝo			
vespermanĝo			

Lingvoilo Esperanto-korektilo en la reto

Stila kaj gramatika kontrolilo

Lingvoilo estas libera plurlingva programo por kontroli stilon kaj gramatikon en Esperanto, sed ankaŭ en multaj aliaj lingvoj.

Lingvoilo atentigas pri tiuj eraroj, kiujn literuma kontrolilo ne trovas. Lingvoilo povas ankaŭ atentigi pri literumaj eraroj, sed la versio por Libreoffice/OpenOffice nur atentigas pri gramatikaj eraroj. Uzu Esperantan vortaron kune kun Lingvoilo por literumaj eraroj en Libreoffice/OpenOffice.

Provu Lingvoilo-n rete sen instali ĝin

Algui vian kontrolendan tekston ĉi tie... Aŭ nur kontrolu tiun ekzemplon. Ĉu vi vi rimarkis, ke estas gramatikaj eraro en tiu frazo? Rimarku, ke Lingvoilo ankaŭ atentigas pri literumaj eraroj kiel ĉi-tiu.

En tiu teksto la eraroj estas substrekitaj

Esperanto



Kontroli

Jen la rekomendoj de Bernard:

Unue, skribu vian tekston.

Due, iru al tiu retejo :

<http://www.languagetool.org/eo/>

Trie, kopiu la tekston, kiun vi skribis.

Kvare, gluu ĝin anstataŭigante tiun ĉi-supran frazon en la griza zono :

Kvine, Alklaku **Kontroli**

Sese, tiam aperas per diversaj signoj la trovitaj eraroj. Kompreneble personaj nomoj estas plej ofte nekonataj kaj menciitaj kvazaŭ eraroj.

Konkludo de Bernard

Se vi ne faras erarojn, vi ne bezonas tiun ilon. Mi ŝatas ĝin, ĉar ĝi permesas al mi ofte forviŝi la erarojn, kiujn mi ne vidis, ĉefe pro manko de atento kaj/aŭ malbona relegado.

En la korektilo, vi povas klaki sur la substrekitaj vortoj kaj vi ricevas klarigojn kaj kelkfoje proponojn de korekto.

Do provu kaj malkovru.

Jen aliaj retejoj utilaj por Esperanto:

<http://vortaro.net/>

<http://www.reta-vortaro.de/revo/>

<http://apertium.saluton.dk/>

<http://translate.google.fr/?hl=fr&tab=wT#fr/eo/>

Nia Kalendaro 2013

Julio 2013	7 - 14 - 21 - 28	Vitarue ankoraŭ okazos en tiuj dimanĉoj de la 10a30 ĝis la 12a30.
Aŭgusto 2013	25	Feriado Eble ekskurso organizita de la grupo de Bazelo
septembro 2013	24 27 30	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Prezentado de Esperanto por kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse
oktobro 2013	1 - 8 - 15 - 22 4 - 11 - 18 - 25 28	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis.

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Printempo en suda Alzaco

